

NI ĈIUJ

INFORMILO PRI ESPERANTO

MEKSIKO, januaro 1983

Nº 1

En la “Enciklopedio de Esperanto”, Meksiklando meritis etan paragrafon de 47 alineojn. Eta? Komparu ĝin, ekzemple, kun tiu de Germanujo, kiu havas 960 alineojn.

En tiu mallonga referaĵo pri nia lando, estas la nomo de iu Vargas, fondinto de la revuo “La Meksika Lumturo” (1903). Tiu s-ro Vargas estas la sama –mi supozas– al kiu la 2an de majo de 1904, Zamenhof skribis esperante ke “la Meksika Societa Esperantista baldaŭ ricevos gloran nomon en la mondo esperantista”.

Kion ni havas post okdek jaroj de tiu pioniro? Multaj fortoj, multaj streboj kaj klopodoj, rimedo monaj kaj homaj perdiĝis dum tiu tempo. El ĉio, kio ĝis nun estis farita, restas preskaŭ nenio...

Sed ni lasu tiun pesimisman dorlotadon!

La celo de tiu ĉi modesta folieto estas informi pri la antaŭenigo de nia lingvo, ĉar celante la internacian lingvon, la informado estas baza ero de nia agado.

Ni konfesas ke nia ambicio estas kunigi ĉies fortojn por atingi nian komunan celon. Ni ankaŭ revas pri granda kaj grava revuo, kies ĝermo estus tiu ĉi informilo. Tamen, ni ne forgesu la vortojn de d-ro Zamenhof, kiu difinis la celon de ĉia agado jene: “Nia plej grava laboro devas esti ĉiam pligrandigi la nombron de la personoj kiuj ellernis nian lingvon.”

Al tiu plej grava laboro ni deziras kontribui.

AŬDITE, VIDITE, LEGITE

Malgranda internacia renkontiĝo esperantista okazis la 13an de januaro. Celante organizi radian esperanto-kurson, ok esperantistoj kunvenis ĉe kafejo Sanborn's por studi la eblecon tuj komenci kurson en Radio Universidad. S-ino Marta Tanguma, entuziasma komencantino oferis sian helpon por tion organizi. Tiel, estis decidite ke Inĝ. Figueroa kunordigos la surbendigon de la kurso, helpata de aliaj membroj. En la kunveno partoprenis ankaŭ s-ro Arias, s-ro Li (el Ĉinio), f-ino Breunninger (Germanio) kaj aliaj meksikaj esperantistoj. Ni esperu realigon kaj sukceson de tiu ĉi grava projekto.

Antaŭ kelkaj monatoj, grava malsano trafis s-ron Nájera, neobligante lin labori por ni afero. S-ro Nájero estas, jam de multaj jaroj, unu el la ĉefaj kolonoj sur kiuj apogiĝas la esperantomovado en nia lando. Ni forte bedaŭras tiun mankon, kaj plej sincere deziras baldaŭan resaniĝon al nia amiko.

Malgraŭ la malsano de la patro, familio Nájera daŭre laboras por esperanto. Jam de kelka tempo ili preparas televidfilmon por propagando kaj ankaŭ televidan kurson. Proprariske ili akiris la necesajn aparatojn por mem prepari la materialon. Ni atendas ties finpretigon por vidi propraokule kio rezultas el tio. Laŭ la penoj kaj laboro (kompreneble ankaŭ mono) investita en tia agado, ni rajtas esperi plej bonajn rezultojn.

Ĉiu informo, detalo, onidiro, klaĉo, helpo aŭ kritiko estos bonvenita de la redaktoro de tiu ĉi informilo. Kun ĉia ajn materialo oni sin turnu al Jorge Luis Gutiérrez. Pachuca 165-3, México 06140, DF. Telephone: 546-1373 (matene).

En la decembra numero de “Esperanto”, la redaktoro iel riproĉas la kolombiajn samideanojn pro tio ke, ĝis nun, ankoraŭ ne aperas la esperanta traduko de “Cent Jaroj da Soleco”. Tamen, ni devas konsideri ke tia verko ne estas facile tradukebla, do, kiu kuraĝos tion fari? Eble pli facile estus komence traduki aliajn verkojn de la Nobel-premiito García Márquez, ekzemple la malgrandan romanon “Al la Kolonelo Neniu Skribas”, aŭ aliajn novelarojn.

Cetere, tio ĉi pensigas nin pri la stato de la latinamerika literaturo rilate la esperantan tradukon. Foliumante la katalogon de la libro-servo de UEA, ni apenaŭ trovas kelkajn latinamerikajn verkojn. En “Esperanto en Perspektivo”, la sola meksika tradukaĵo estas “Kvin Poemoj el Pleno”, de Amado Nervo, aperinta en 1941. Kial avari a la internacia legantaro la verkojn de Paz, de Fuentes, de Rulfo, de Pacheco? Pro tio, kaj celante iam eldoni “Meksikan Antologion”, ni volas inviti ĉiujn interesitojn partopreni traduk-rondon. Oni turnu sin al la redaktoro de tiu ĉi informilo.

Ĉiu kiu volas pagi sian kotizon al UEA por la kuranta jaro 1983, kontaktu s-ron Arias kiel eble plej baldaŭ. La kotizo estas du mil pesoĵ, sed eble iom altiĝos. Vi povas ankaŭ aldoni iomete pli por la sendokostoj.

“Mi faris por la afero ĉion, kion mi povis, kaj se ĉiu efektiva amiko de la lingvo internacia alportos al ĝi eĉ la centan parton de l’ moralaj kaj materiaj oferoj, kiujn mi al ĝi enportis tra dekdu jaroj ĝis hodiaŭ, tiam la afero iros bonege kaj venos a la celo post mallonga tempo. Na laboru kaj esperu!” Tion ĉi skribis Zamenhof en 1888. Do, li postulis nur centonon de dekdu karoj! Tio estas ne pli ol monato kaj duono. Kiu volas oferi tiom?

NI ĈIUJ

INFORMILO PRI ESPERANTO